


# **BONA ESPERO**



**Revuo de la Esperanto-  
Asocio de Suda Afriko  
Numero 1  
2006**

## *La Redaktoro*

Kontribuaĵojn sendu papere (prefere maŝinskribite), aŭ en elektronika formato al la redaktoro:

Poŝte:

Johan KÖHLER  
P.O. Box 245  
WINKLESPRUIT  
4145  
Respubliko de Sud-afriko

Retpoŝte: [kohlerj@webmail.co.za](mailto:kohlerj@webmail.co.za)

Ĉi tiu revuo iras al la membroj de la Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA). Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la kasisto. Ne-membroj povas aboni, skribante rekte al la kasisto.

S-ro C. Beckford  
43 Fairview Crescent  
MILNERTON RIDGE  
7441  
Respubliko de Sud-Afriko

# Enhavo

Komunuma retejo por ELNA.....	4
Kiel krokodiloj fariĝas klubanoj.....	6
Kvin krimaj kvaropoj kaj kelkaj kromaj kadavroj.....	12
Pasporta Servo - Ni montru la gastigemon de Sudafrikanoj!....	24
Anekdotoj.....	27
La esprimo “Krokodili” .....	29

## Redaktore

# Komunuma retejo por ELNA

Kiel plej multaj Esperanto retejoj, Esperanto-USA celas informi al vizitantoj kaj membroj pri Esperanto kaj siaj aktivecojn. Ĝi tamen unikas, pro tio ke siaj anoj aŭtomate ricevas propran blogon.

Antaŭ nelonge la Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko lanĉis novan retejon bazita je la sistemo Drupal-o. Drupal-o estas liberfonta enhav-peranta sistemo (EPS) (angle: Content Management System aŭ CMS). EPS-oj faras distingon inter la enhavo kaj la aspektigo de la enhavo. Drupal-o havas mem kelkajn allogajn teknikajn avantaĝojn pri kiuj mi ne nun parolos. Ĝenerale tamen, ĝi multe plifaciligas ne nur la kreado de retpaĝoj, sed ankaŭ la posta redaktado, serĉado, aspektigo ktp. Kunlaborantoj aliĝas la retejo, kaj laŭ diversaj permesniveletoj povas krei kaj kunlabori pri diversaj specoj de enhavo inkluzivante libroj (plurĉapitraj verkaĵoj), artikoloj (ĵurnalecaj artikoloj), personaj taglibroj aŭ "blogoj", recenzoj ktp. Oni povas enkategoriigi verkaĵojn laŭ difinitajn kapvortojn, aŭ lasu ĉiu aŭtoro elpensi taŭgajn kapvortojn. Oni povas aperi aŭtomate faritaj listoj de ekz. lastatempaj artikoloj, aŭ artikoloj pri iu temo. Legantoj povas aliksi rimarkojn aŭ diskutojn laŭ enhavtipo. Aldonendas, ke la kunlaborantoj ne nepre sciu ion ajn pri HTML - granda avantaĝo.

En la retejo, ELNA klarigas kial ili ŝanĝis de la malnova retejo al Drupal-a komunumo. Oni diras, ke la malnova retejo estis aro da html-dosieroj, kiun oni devas permane redakti kaj ĝisdatigi. Malmultaj homoj havis permeson fari ŝanĝojn, kaj iom post iom la retejo iĝis malĝisdata kaj ĝenerale malfreŝa. Pro tio, ke la

informoj malfreŝis kaj noviĝis, legantoj ne al revenis al la retejo de ELNA - ĝi do tute perdis sian utilecon kiel informilo.

La fenomeno de komunumaj retejoj estas sufiĉe konata en Interreto, sed ĝi pli kaj pli populariĝas je la nomo Web 2.0. En Esperantio, ni antaŭ kelkaj jaroj ekvidis la "vikiajn" retejoj. Post tio, Ĝangalo estis unu el la unuaj komunecaj retejoj. ELNA estas la unua landa asocio kiu utuiligis Drupalon, laŭ mia scio, kvankam ankaŭ mi ekpensis pri tio por EASA. Ĝenerale, la nova retejo de ELNA ja aperas pli vigla kaj alloga. Tamen, kelkaj homoj je la ELNA retejo opinias ke liberigo de la organizaĵa retejo ne estas bona ideo ĉar la personaj opinioj povas (ŝajne) malkongrui kun la organizaj.

Ni certe vidos multe pli da tiaj retejoj postnelonge, kaj mi opinias, ke reta Esperantujo pli viglos, pro tio.

# Kiel krokodiloj fariĝas klubanoj

**Por tiuj, kiuj amas ĉion verdan kaj vivantan, klubo estas la plej natura kaj ofta formo de kunvivado. Kiel ĝi vivas? Kiel ĝi kreskas? Kiel oni povas kreskigi ĝin?**

El gazeto *Kontakto*, verkita de Miĥail Kordonskij kaj Tatjana Auderskaja, Ukrainio (longjaraj gvidantoj de kluboj)

Klubon oni facile povas percepti kiel io vivanta: ĝi embriiĝas (ne ebriiĝas!), ĝermas, naskiĝas, kreskas, floras kaj velkas, falas forhakita aŭ putras starante, seke elstaras aŭ kuŝas trunke. Post sukcesa vivo, el semoj kreitaj de ĝi kreskas novaj klub(id)oj. Reproduktiĝas kluboj ofte vegetative. Tamen okazas iam naskiĝo de unu klubo el la fino de alio per turmenta procezo, kutime konsiderata de ĉia partoprenantoj kiel konflikto kun skismo. Ni devas agnoski, tamen, ke ankaŭ veraj skismaj malsanoj povas okazi kaj rezultigi tute male la morton de klubo.

Por kresktigi bonan klubon, oni devas posedi aŭ talenton kaj intuicion, aŭ (prefere certe ne *aŭ*, sed *kaj*) la sperton kaj sciojn. Eta parto troviĝas en ĉi tiu artikolo, sed la reston vi trovas en lernolibroj kaj monografioj pri klubologio, socia psikologio, sociologio kaj eĉ iom-maliom en filozofio.

Ĝuste ĉe la granda filozofo Hegel troviĝas la nocio “klubo” en preskaŭ moderna senco de la vorto. La sociologoj nomas tion “socia unuiĝo”, sociaj psikologoj “neformala grupo”. Tiu malnovulo, kiu samtempis kelkajn klubojn, certe konsentus, ke la klubo ne estas super-porda ŝildo, kaj eĉ ne ejo-subtenejo sub ĝi, sed unuavice homoj, aŭ pli ĝuste dirite, speciala sistemo de rilatoj en malgranda grupo de homoj, kiun klubanoj nomas “la kerno de

la klubo”.

## *Libera unuiĝo*

La specialeco de tiuj rilatoj kuŝas unuavice en ilia libervoleco (ne konfuzu kun demokratio). Laŭ la maniero de gvidado, kluboj povas esti, kaj foj-foje estas, absolute aŭtokratiaj, dum la regopovo de la gvidanto povas fondi el tute psikaj (nekontestebla prestiĝo), same kiel el plene materiaj kondiĉoj (posedo de klubaj rimedoj, ekzemple ejo). Iu kreinto de kluboj kutimis diri: La kluba demokratio signifas: memvole vi venis, memvole vi obeŭ al la klubaj leĝoj; se ne, do memvole vi foriru.

Do, ni havas la memvolecon en senco libera elekto; sed tio ja ne sufiĉas. En libera socio oni povas elekti kaj loĝlokon, kaj laboron, sed tio ne egaligas klubon de bier-amantoj al bier-fabriko. Por kio biero? — jen esenca demando. Se la produktantoj mem konsumas ĝin, do ni vidas ne fabrikon, sed ĝuste klubon: memvolan unuiĝon de homoj, kiu estis kreita por senpera kontentigo de iliaj propraj bezonoj. La plimulto de reale ekzistantaj kluboj kontentigas certe ne la karnajn, sed sprirtajn bezonojn de homoj. Interese, ke rilate al la propra agado kelkaj kluboj estas nekorekte perceptataj fare de siaj membroj: tiel, la teatra klubo opinias sin mem teatro, aŭ la klubo de prohomserĉantoj ekspedicio. La veron oni facile konjektas laŭ la nombro de spektantoj kaj trovitaj prahomoj. Lastatempe iĝis modo ĉe ni krei diskutklubojn malantaŭ kuliso de politikaj partioj.

## *Kiamaniere oni ĝin faru?*

La plej disvastigita eraro inter nespertaj klubkreantoj estas la sekva: ni povas krei bonan klubon de krokodilamantoj, ĉar ni ĉiuj ŝatas krokodilojn. Laŭsence kaj laŭesence, aplikendas ĉi tie la klasika suspekto de Porketo antaŭ la Hefelanto: ĉu entute Hefelantoj simpatias al Porkoj, kaj se jes, do kiamaniere ĝi ilin

ŝatas? Antaŭ ol elspezi por estonta klubo siajn fortojn, rimedojn kaj monon; antaŭ ol peti la samon ĉe eventualaj subvenciantoj kaj oficialuloj, promesante al ili reklamon kaj bonan statistikon (kaj al subvenciantoj kaj oficialuloj antaŭ ol doni), estus necese klarigi por si mem pli precize tiun kiamaniere:

Inter kvinopo de krokodilamantoj povas tre verŝajne okazi ke:

- la unua volas scii pli multe pri krokodiloj (ho, kiom proksima al koro de ĉiu esperantisto temo!). Ŝi/li bezonas bibliotekon, komputilon kaj datumbazon kaj oficevojaĝon al natura krokodilejo;
- la dua jam havas krokodilon kaj volas dresi ĝin. Ŝi/li bezonas basenon kaj antilopojn;
- la tria volas elbredi novajn rasojn de krokodiloj. Ŝi/li bezonas elektronan mikroskopon kaj gama-elradiilon;
- la kvara deziras plibonigi homojn, sur la bazo de kunesto kun krokodilo. Ŝi/li bezonas krokodilon kaj grupon de volontuloj;
- kaj fine, la kvina ŝatas babiladi pri krokodiloj, precipe kun personoj de la alia sekso. Ŝi/li bezonas seĝojn, tablon kaj tasojn.

## *Kontenteco*

Vi povas eĉ ne dubi, ke tiuj kvin ne kreos la klubon, ĉar sur la sama bazo de enhavo de agado ili provas kontrui diversajn sociajn tipojn de kluboj, destinitajn por kontentigo de diversaj homaj bezonoj. La unua klubo kontentigas pasivan estetikan bezonon je arto, scioj, kuniĝo kun naturo. La dua kaj tria estas lokoj, kie homo povas realigi sian kreaŭ potencon, kontentigi aktivan estetikan bezonon. La kvara estas destinita por memperfektiĝo en, versxajne, morala-etika sfero. La kvina klubo estas fonto de la sola vera valoregaĝo, laŭ opinio de Antoine de Saint-Exupery



(verkisto kaj aviadilisto, 1900-44) — la trezoro de homa interkomunikiĝo. Tio estas la plej disvastigita kaj la plej facile atingebla tipo de klubo. Interalie, al ĝi transformiĝas ĉiuj aliaj tipoj iom post iom danke al entropio, aŭ pli simple dirite, pro maljuneco kaj pigreco.

La dua sufiĉe ofta misopinio: ke oni povas ĉion tion samtempe samloke kunigi. Do, en baseno naĝas krokodiloj kaj metas sub mikroskopon jam priradiitajn ovojn; kaj sur la bordo, apud samovaro kaj komputilo, la klubanoj interkomunikiĝas kun krokodiloj kaj inter si mem.

Sed praktike ja normalaj homoj eĉ en riĉaj landoj, eĉ kun la helpo de ŝtato aŭ monliverantoj, apenaŭ amasigas rimedojn por ĉio kune. Se ekzemple sufiĉos mono por aĉeti unu krokodilon kaj lui la banĉambron por ĝi, por komputilo kaj libroj tie estos tro humide, kaj por tema komunikado tro malvaste. Tio certe ne signifas, ke homaj rilatoj tute forestas. En ĉiu klubo pli aŭ malpli okazas kaj memesprimado, kaj memperfektiĝo, kaj konatiĝo kun estonta familio. Sed iu sola afero ĉiam, malgraŭ volo kaj plaĉo, iĝas la ĉefa, elpremante la aliajn, kaj la procezo de elekto povas transformi iun ajn klubon al klubo de konflikt-amantoj. Se vi ne volas tion, do konformigu, kiel ĉiam en la vivo, viajn dezirojn al viaj eblecoj, kaj elektu iun solan temon.

## *Malfermiteco*

Nun estas difinita ne nur enhavo, sed ankaŭ socia tipo de via klubo. Venis tempo pripensi pri ĝia sociteknika formo: kiom da personoj konsistigos la klubon, kiam kaj kiel ili renkontiĝos, kiun oni akceptas aŭ ne akceptas kiel klubanon ktp. La ĉefa parametro de sociteknika formo estas la grado de malfermiteco en la klubo: depende de ĝi, la gamo de diversaj formoj estas distribuita inter du ekstremaj variantoj. Ni nomu ilin modelo *Tramo* kaj modelo *Aviadilo*.

Por la *Tramo*, apero de la klubo estas komenco de movado. En ĉiu kluba kunsido (haltejo) la pordoj malfermiĝas por ĉiuj, kiuj deziras en- aŭ eliri. Nur la ŝoforo kaj malgranda grupo da pasaĝeroj veturas de komenco ĝis fino; la plejparto de la vizitantoj estas homoj sendependaj kaj per nenio fikse ligitaj al la klubo. Dume la *Aviadilo* estas malfermita nur antaŭ ekflugo. Post tio neniu nova povas tien eniri. La “fermiteco” estas garantiata per sistemo de aneco, aŭ simple per solidareco de unuigita kolektivo, kiu forpuŝas fremdulojn.

Male, por kreo de “malfermiteco” estas necesaj reklamo kaj bonkoreco al vizitantoj. La *Aviadilo* kutime entenas 8-15 personojn, kaj dum ĝiaj raraj “alteriĝoj” proksimume 80-100 personoj entute povas trairi ĝin. En la *Tramon* povas eniri po fojo eĉ 30, kaj dum la tuta tempo de ĝia ekzisto miloj kaj eĉ dekoj da miloj da interesatoj. La malfermita klubo reprezentas amasecon, la malfermita efikecon. *Tramo* estas malkara, ĝi veturigas multajn, sed malrapide kaj nemalproksimen; *aviadilo* alten kaj malproksimen, sed pli malmultajn kaj pli multekoste.

Sed kio estas strange, ambaŭ veturigas nin samtempe, sed laŭ diversaj vojplanoj kaj al diversaj lokoj. Ĉiu homo kun helpo de klubo translokiĝas al alia loko de si mem, en alian staton de sia animo. Ŝi/li trovas novan aspekton de sia personeco – kaj ĝuste por tio estas necesaj la kluboj, ĝuste tiu estas ilia funkcio en la socio.

Jen ankoraŭ kelkaj koncizaj konsiloj por luantoj kaj luigantoj de kluboj kaj kluba ilaro. Plenforta kaj plenvalora klubo povas elkreski nur en aparta ĉambro. Plej facile najbaras kluboj de diversaj enhavoj, sed laŭ sama socia tipo. Ne devigu du ekologiajn klubojn uzadi la saman ilaron: ili kulpigos unu la alian pri ŝtel-ĉasado. Kaj male, klubo de ŝatantoj babiladi pri kino tute amike dividos vidbendilon kun klubo de ŝatantoj babiladi pri sekso (kaj klubo de ŝatantoj babiladi pri Esperanto en sia nacia lingvo povas unuiĝi kun ajna babilklubo, ĉu ne?).

La daŭro kaj efektiva vivo de bona klubo varias de 3 ĝis 6 jaroj. Ĝi dependas de la aĝo (infanaj kluboj vivas pli mallonge) kaj de la intenseco de interkomunikado (certe, pli longe vivos tiu klubo, kies anoj pli malofte renkontiĝas).

Memoru, ke klubo ne estas nur laborloko! En klubo vi ne nepre bezonas ĉiam agi korekte. La klubo – ĝi estas por la animo!



*Membro Elisee Byelongo kaj vizitanto Benjamin Kabwe varbas por la Esperanto Klubo Durbano ĉe Universitato de KwaZulu-Natal. Fotis J. KÖHLER*

## Literaturo

# Kvin krimaj kvaropoj kaj kelkaj kromaj kadavroj

Esperantaj krimverkistoj ial preferas seriojn el kvar romanoj, konstatas Sten Johansson en sia ampleksa artikolo pri originalaj krimromanoj en Esperanto. La krimromanoj laŭ li suferas pro similaj mankoj kiel aliaj Esperantaj verkoj: mallerta tekniko de literatura kreado, stranga lingvaĵo, la manio verki kaj eldoni por pruvi, ke tio eblas en Esperanto. Tamen ĉe tiaj distraj verkoj tio laŭ li eble malpli multe ĝenas, ol ĉe verkoj kun pli serioza celo. Distraĵoj laŭ Sten Johansson estas gravaj ne nur por distro, sed ankaŭ por trakti interesajn kaj eble malfacilajn temojn, kaj krome por la lingva evoluo.

Prelego de Sten Johansson, prezentita en la Kultura Esperanto-Festivalo de Helsinko, 2005.

El Libera Folio (<http://www.liberafolio.org/2006/krimromanoj/> )

Ne facilas difini, kio estas krimromano. Se iu demandus min, mi dirus ke la rakontoj pri Sherlock Holmes, Hercule Poirot, komisaro Maigret estas krimromanoj. Aliflanke, Krimo kaj Puno de Fjodor Dostojevskij ne estas krimromano. Kompreneble troviĝas multaj limaj kazoj. Tipe temas pri distra, leĝera verko, kie krimo kaj solvado de krimo estas ĉefa parto de la intrigo, sed eblus ĝismorte diskuti, kiel difini kaj limigi la ĝenron. Mi tamen ne trovas tian harfendadon tre interesa, sed simple traktos tion, kio laŭ mia subjektiva takso nomeblas krimromano.

## Historio

La unua originala Esperanta krimromano aperis en 1920. Ĝi estas *Pro kio?* de Argus, pseŭdonimo de Friedrich ELLERSIEK,

germana movada aktivulo. Mi ne legis ĝin, sed laŭ la priskriboj – interalie de William AULD kaj Herbert MAYER – ĝi ŝajnas tradicia detektivromano ne tre lerte farita en internacia medio, en kiu enplektiĝas ankaŭ amafero, kio cetere ne estas unikaĵo en ĉi tiu ĝenro.

Oni ofte konsideras krimromano la verkon *Mr Tot aĉetas mil okulojn* de Jean FORGE, pseŭdonimo de Jan FETHKE, el 1931. Mi ne tute konsentas, ĉar en ĝi la eventuala krimo ludas ne tre gravan rolon en la intrigo. En sia recenzo Julio BAGHY skribis pri ĝi: "Tiu ĉi verko donas literaturon. Nur vera talento povas tiel majstre kontentigi la gustojn de la literaturamanto kaj de la nura distroserĉanto." (*Literatura Mondo*, aŭgusto 1931) Nu, mi malkonsentas ankaŭ pri tiu juĝo; laŭ mi ĝi suferas de terure kliŝa kaj kiĉa stilo, sed prefere ni lasu ĝin, ĉar mi ne enlasos ĝin en la liston de krimromanoj.

En 1948 aperis en Danio krimromano de iu Carl LINDQVIST. Ĝia titolo estas *Ferio kun la morto*, sed jen ĉio kion mi scias pri tiu verko kaj verkisto.

Ĉi tiu prelego ne komenciĝas tre bone, ĉu? Nu, ne timu, ekde nun mi parolos ĉefe pri libroj kiujn mi ja legis!



En 1958 aperis *Tiel okazis: aŭ mistero minora* de Ferenc SZILÁGYI. SZILÁGYI estis hungaro longe vivanta en Svedio, kaj unu el la plej elstaraj Esperantaj stilistoj. Li estis redaktoro de la kultura revuo Norda Prismo, redaktoro de antologioj, tradukinto el la hungara kaj sveda, kaj originala novelisto. Tiel okazis estas lia sola romano, kaj ĝi estas nekutima kaj diskutibla

krimromano, kie plej gravas la psikologio. Ĝi baziĝas sur la unika ideo, ke iu persono pere de muzikaĵo ekscias, ke okazis ia dramo, kaj li vere sukcesas solvi la misteron, ankaŭ per muziko.

## *Komenco de kvaropeco*

Post 1958 sekvas du mallumaj jardekoj, almenaŭ se temas pri Esperanta originala literaturo. Sed en 1976 komenciĝas nova epoko, kaj jen ekĝermas la unua krima kvaropo, ĉar kiel vi vidos, la Esperantaj krimverkistoj preferas verki seriojn el kvar romanoj. En 1976 do aperis *Ĉu vi kuiras ĉine?* de Johán VALANO, pseŭdonimo de Claŭde PIRON. Poste sekvis kun dujaraj intertempoj ankoraŭ tri ĉu-romanoj – *Ĉu li bremsis sufiĉe?*, *Ĉu li venis trakosme?* kaj *Ĉu ni kunvenis vane?*. En ili ni renkontas la detektivon Jano KARAL, lian edzinon, la psikologon Ĝoja KARAL, kaj ŝian nevon Stefano, kaj tiu triopo solvas la murdojn en ĉiuj kvar verkoj. Ili vivas en regiono Sanktavallo, kie oni parolas apartan Esperantan dialekton, tamen tre facile kompreneblan, ĉar temas ĉefe pri eliziado de kelkaj o-finaĵoj.

La ĉefaj valorajoj de la ĉu-libroj, laŭ mia opinio, estas la flua kaj facile sekvebla rakonta fadeno, la zorge konstruitaj, iom komplikaj intrigoj kaj la viglaj dialogoj. Iufoje troviĝas ankaŭ interesaj mediopriskriboj. La personoj ofte estas iomete kliŝaj, kaj la verkisto laŭ mia gusto iom tro emas priskribi iliajn psikajn trajtojn, prefere ol lasi ili mem agi kaj montri, kiaj ili estas, kiel mi preferus. Kvankam la dialogoj estas tre fluaj, ili ofte ne impresas tute naturaj. Jen kaj jen la romanoj de Valano traktas ankaŭ sociajn temojn, kiel politikajn intrigojn, traktadon de tielnomataj gastlaboristoj, protektadon de kulturaj medioj kaj alion. Tamen ne temas pri vere realismaj verkoj. Plej plaĉas al mi el la kvaropo la lasta, kiu ne okazas en Sanktavallo, sed en internacia konferenco en Alma-Ato. La ĉu-libroj same kiel multaj krimromanoj disponigas al la leganto arojn da indikoj kaj suspektatoj, sed

apenaŭ eblas legante solvi la kazojn. Precipe en la unua el ili, aperas oftaj kaj tedaj klarigoj fare de la aŭtoro pri la aparta lingvaĵo uzata de Sanktavalanoj, kio fakte ĝenas la rakonton kaj sabotas la senton de ĉeesto en la okazaĵoj.

### *Tri aŭtoroj Dorval*

La kvaropo de VALANO do kompletigis en 1982, kaj en la sekva jaro ekis krima kvaropo de Deck DORVAL, pseŭdonimo de kolektivo el tri flandroj, Frans VAN DOOREN, Jef BEECKMANS kaj Jos DECKKERS. El tiuj VAN DOOREN estis la ĉefa verkisto. Krome, al la du mezaj verkoj de la serio, kunlaboris ankaŭ Christian DECLERCK, bedaŭrinde, ĉar tro da kuiristoj kaŝon difektas, aŭ, kiel skribis Jorge CAMACHO en recenzo pri Nigra Magio, la tria libro: "Deklerko murdis Dorvalon. Se vi tamen volas aĉeti la kadavron, ne forgesu, ke malsufiĉas PIV kun Suplemento..." Cetere, en letero al Literatura Foiro la aŭtoro mem skribis: "Mi bedaŭregas la malfeliĉajn ekscentrikaĵojn en mia 'Kazinski venas tro malfrue'. La fuŝado okazis sen mia aprobo."

Tamen ni komencu de la komenco. DORVAL evidente preferis la tradician specon de krimromano, kie la detektivo – kaj la leganto – kunmetas puzleron post puzlero el zorge provizitaj indikoj por fine malkaŝi la kielon kaj kiuon de la murdoj. Gravas preskaŭ nur la krimintrigo, do li tre malmulte uzas ĝin por trakti aliajn temojn. Priskriboj pri medioj kaj personoj tre malmulte aperas. Dialogoj oftas. Krome li preferis la formon "fermita ĉambro", kie oni scias certe, ke la kulpinto troviĝas en difinita rondo. En la unua libro, *Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton* el 1983, li solvis tion simple kaj bone lokante la tuton al ŝipeto, iomete kiel Agatha CHRISTIE en *Morto sur Nilo*. La konstruo de la intrigo estas zorga kaj sukcesa. Temas pri la speco de intrigo, kie gravas horaro kaj alibioj, kaj kie iom post iom montriĝas ampleksa aro da motivoj kaj sekretaj interligoj. La inspektoro Ksavero KANT, kiu rolas en

ĉiuj kvar verkoj, ĉi tie faras efikan laboron. Ion similan oni povas diri pri la kvara, *Urd Hadda murdita*, el 1990. Tie tamen la ŝlosita ĉambro estas pli malverŝajne kreita. Krome DORVAL ŝajne laciĝis ĉe la fino, ĉar ĝi estas malpli bone farita el verkoteknika vidpunkto, kun pli da aŭtora rakontado ol da scenoj kaj dialogoj.

Ankaŭ la dua libro, *Kazinski venas tro malfrue* el 1987, similas la du menciitajn laŭ sia konstruo kaj enhavo, dum la tria, *Nigra magio* el 1988 (kiu eble estas la unue verkita) ne estas tre sukcesa. Sed pli gravas, ke ili ambaŭ estas lingve fuŝitaj de Chris DECLERCK, kiu reverkis ilin en tre malplaĉa lingvaĵo kun amaso da stultaj kaj nemotivitaj monstraj elpensaĵoj, kiel dre, erst, ma, men, pre, ste, tras, davi, glanci, kejfi, kiri, nipte, rinki, ruga, tingo ktp.

## *Pinto de l'arto*

Ni forgesu la malĝojigan historion pri lingva fuŝado de verkoj enhance bonaj. Anstataŭe ni transiru al la plej altnivela kvaropo. Temas pri verkoj el 1988-2000 de Serĝo ELGO, pseŭdonimo de Georges LAGRANGE. Li estis konata kiel teatraĵisto, kaj en liaj verkoj la intrigo ne tiom gravas, kiom la scenoj, etosoj kaj personoj, precipe la rilato inter la personoj kaj la medioj, ofte de provincaj urbetoj. Temas pri kvar tre ĝueblaj verkoj. En ili oni renkontas ankaŭ sociajn temojn, kiuj gravis al la aŭtoro, kiel la rilatoj inter klasoj, seksoj kaj generacioj, krome politikaj kaj religiaj aferoj. ELGO estis sufiĉe akra kritikanto de socia hipokriteco, religia bigoteco, klasa fiero, politika stulteco kaj alio. La formo estas realisma, kaj ĉio estas lokita al anonima lando kiu similas Francion, kie inspektoro KRAMER ne tre sagace solvas siajn kazojn. En la unua verko, *Ŝia lasta poŝtkarto* el 1988, ni renkontas homojn el diversaj sociaj klasoj, etnoj kaj vivostiloj, kiel riĉuloj, laboristoj, artistoj, krimuloj kaj gejunuloj vivantaj alternative, iom ekster la socio. Bedaŭrinde la aŭtoro en ĉi unua verko montras relative malestimman sintenon al la virinaj figuroj de sia rakonto.



La dua libro, *La nokto de la ezoko*, temas ne pri aktuala krimo, sed pri eventuala militkrimo de antaŭ jardekoj, krome ĝi enhavas bonege faritan amaferon inter du ne plu junaj gefraŭloj. En tiu verko do la celo ne estas kapti la krimulon kaj treni lin antaŭ juĝiston. La vera celo estas por la ĉefa protagonisto seniĝi de kulpo kaj honto pro eventualaj agoj de liaj gepatroj. Kaj por inspektoro KRAMER la motivo estas forpeli enuon dum konvalesko.

En la tria libro, *La floroj de l' krepusko* el 1995, aperas politikaj teroristoj laŭ la stilo de Eŭropaj 1970-aj jaroj. Bedaŭrinde aperas ankaŭ iom tro da predikoj, ne nur de la teroristoj, sed ankaŭ de la aŭtoro, kaj la dialogoj estas malpli viglaj kaj vivaj ol en la aliaj tri verkoj. Fine, en *Surklifa* el 2000 oni trovas komplikajn familiajn rilatojn kaj memorojn el la dua mondmilito kiuj daŭras dum generacio post generacio. Plej bonas en ĉi tiu verko la stilo kaj atmosfero. Aperas ankaŭ ĉi-verke predikoj, ĉi-foje kontraŭ religio, sed ilin prezentas taŭga rolulo, kripla maljunulo en kafejo, kun la rolo de saĝa diranto de veroj en la verko. Kiel mi jam menciis, la krimosolva intrigo ne estas la ĉefa valoraĵo de ĉi tiuj verkoj, kaj fojfoje la interna logiko de la enketado iomete lamas, kaj la finoj de la libroj ne ĉiam egalas la altan nivelon de la ĉefaj partoj. Tamen inspektoro KRAMER kompreneble solvas la kazojn, dank' al hazardoj kaj helpo de la aŭtoro.

## *Krimo en universitata medio*

La kvara kvaropo estas tiu de Ronald Cecil GATES, aŭstralia profesoro pri ekonomiko, kiu lernis Esperanton en 1987, kaj inter 1991 kaj 1997 aperigis kvar krimromanojn kaj tri kolektojn de krimnoveloj. La romanoj estas *La septaga murdenigmo* el 1991, *Kolera afero* el 1993, *Morto de sciencisto* el 1994 kaj *La vidvino kaj la profesoro* el 1997. La unua kaj tria verkoj (la duan mi ne legis) estas relative amatorecaj verkoj el vidpunktoj literatura kaj lingva. Ili disvolviĝas en aŭstralia universitata medio, kaj gravas

ĉefe la motivoj kaj alibioj, ne la psikologio aŭ homaj rilatoj. Mankas fokuso, ĉio estas rakontata samtone, samdetale. Tamen, en la tria verko la intrigo saĝnas al mi iom pli sukcesa ol en la unua. Abundas koincidoj, kaj la loka koloro estas pala.

La kvara verko – *La vidvino kaj la profesoro* – tamen estas alia. Ĝi estas pli ampleksa, kaj pli koncentrita. La krimintrigo estas pli simpla kaj pli realisma. Aldoniĝas intrigo pri la rilato de la profesoro al du virinoj. Kvankam unu el tiuj virinoj estas nura ŝablono, tamen profundiĝas la karakteroj de la rolantoj, kompare kun la fruaj verkoj de GATES. Kelkfoje daŭre iom komikas lia manio ĉion trakti kun sama emfazo kaj pedante kiel kontisto raportoj la plej sensignifajn detalojn. Tamen la rakonto plej ofte fluas glate. GATES adaptas la verkadon al sia kapablo, kaj tia modesteco ne estas tre ofta en la esperanta literaturo.

## *Krimo de la memrecenzo*

Pri la kvina kvaropo mi eĉ pli malfacile parolas. Temas pri miaj propraj kvar krimromanetoj, aperintaj de 1997 ĝis 2003. Ili estas *Falĉita kiel fojno*, *Trans maro kaj morto*, *Neĝo kaŝas nur...* kaj *Memor' mortiga*. Prefere aliaj homoj recenzu ilin, sed mi povas diri ion pri miaj intencoj. Do, mi volis uzi la krimromanformon por trakti aferojn, kiuj interesas min, ĉefe homajn karakterojn kaj interrilatojn kaj kelkajn fenomenojn de la nuntempa socio en kiu mi vivas. Krome mi volis uzi la realan geografion kie mi naskiĝis kaj kreskis en la sudorienta parto de la provinco Smolando, ĉe la Balta maro. Mi kreis du policistojn, la pli trankvila, iom rezignema SVEDBERG, kaj la pli vigla, ironia JANKÉUS, kaj en ĉiu el la kvar romanetoj mi klopodis ke troviĝu almenaŭ du-tri personoj plurdimensiaj, kiuj espereble povus interesi la legantojn.

Kvankam la lokoj de krimo troviĝas en Svedio, mi volis enplekti ankaŭ internaciajn rilatojn, el ĉirkaŭ la Balta maro kaj pli

fore. La sociaj temoj traktataj estas drogdependo, prostituado, pedofilio, tielnomata "novepoka" religio, traktado de rifuĝantoj, ksenofobio, rasismo, religia maltoleremo, perfortemo, klasa fiero, seksismo kaj verŝajne ankoraŭ kelkaj, tamen ne ĉio en unu libro, kompreneble. El lingva vidpunkto mi volis uzi la normalan, vivantan Esperanton hodiaŭan, tamen escepte aperas iu figuro kun aliaj lingvaj kutimoj. Se fari unu konkludon el la verkado de tiuj kvar romanetoj, mi dirus ke krimromanoj kutime pli facile legiĝas ol "ordinaraj" romanoj, sed tio ne signifas ke ili pli facile verkiĝas.

## *La kromaj kadavroj*

Tamen ne ĉiuj Esperantaj krimromanoj aperas kvarope. En 1981 aperis la historia krimromano ***Regulus*** de LORJAK, pseŭdonimo de Jacques-Louis MAHÉ, franca filmisto kiu verkis entute sep romanojn kaj unu novelaron kun diversspeca enhavo, sed ĉiuj distraj, humuraj kaj verkitaj en tre bunta kaj sprita lingvaĵo. En ***Regulus*** ni spertas krimajn intrigojn kaj policenketon en Parizo dum la deksepa jarcento, kaj ĝi estas kvazaŭ omaĝo al la baroka Parizo, kiun LORJAK priskribas tiel ke oni vere sentas la odorojn kaj aŭdas la bruon de la tiama urbego. Kelkloke eble estas iom tro da buntaj priskriboj, ekzemple la romano komenciĝas per dudekpaĝa promeno tra Parizo, dum kiu nenio grava vere okazas. Dum la mediopriskriboj ŝajnas tre aŭtentaj, la metodoj de la polico kaj de iu skandal-ĵurnalisto konkuranta kun la polico, ŝajnas iomete tro modernaj, sed tio eble povas esti intence ironia trajto. Ĉiel ajn, post la komenca promeno, la ĉeno de okazaĵoj estas rapida kaj atentokapta.

Alia krimromano en tute alia stilo estas ***La mortsonorilo de Chamblay*** el 1983, de Karolo PIĈ. Mi iom hezitas nomi ĝin krimromano, ĉar ĝi estas precipe gotika horror-romano de tradicia speco el la deknaŭa jarcento. Oni rajtas demandi sin, kial verki

tian en la 1980-aj jaroj. Piĉ kompreneble pretekstas evoluigon de la Esperanta proza lingvaĵo, sed mi pli firme kredas, ke simple tiu ĝenro logis kaj fascinis lin. Nu, okazas krimo kaj oni alvokas policiston por enketi. Tamen ĉiuj rolantoj dediĉas sin ĉefe al tradiciaj ingrediencoj de romantike gotika hororaĵo.

Temas pri kastelo kun preĝejo, kapeloj, kriptoj, kaŝitaj tuneloj, sekretaj pordoj kaj kaŝejoj, keloj, turoj, torturejo kaj puto. Temas pri sonoriloj kiuj sonoras sen konata kaŭzo kaj orgenoj kiuj ludas ne nur muzikon sed krome murdojn. Temas pri ĉiaj misteraj figuroj en la grafa kastelo, pri la sanga kaj krima historio de mezepokaj kastelestroj kaj estrinoj, pri murdoj kaj adulto, pri skeletoj kaj frakasitaj kranioj, pri fantomoj kaj kadavroj, glavoj kaj hakiloj, malnovaj arkivoj, misgvidaj mesaĝo-slipoj, sekretoj, misteroj kaj nediveneblaj enigmoj. Do, se oni ŝatas tion, oni ricevas ĝissate. La lingvaĵo plejparte estas normala, moderna Esperanto, tre maldense spicita per la personaj piĉismoj de la aŭtoro, proksimume po unu en kvin aŭ dek paĝoj, do la lingvaĵo ne estas malhelpo por ordinara leganto.

En 1988 aperis verko de la tute nekonata italo Corrado TAVANTI. Temas pri *Varmas en Romo*, kiu surprizis kiel tre profesi-impresa krimromano kun konvinkaj detaloj kaj tre rapida, efika ritmo de la eventoj. En ĝia intrigo ni renkontas murdojn, atencojn kaj minacojn fare de ia esperantista Liberiga Armeo, almenaŭ ŝajne. Kiel ajn freneze tio sonas, TAVANTI sukcesas fari el tio funkciantan intrigon, kaj pro la rapida ritmo oni apenaŭ havas tempon dubi. Li sukcesas tre konvinke prezenti la sufokan, ŝvitigan varmon de Romo en somero kun ĝiaj odoroj kaj fetoroj. Aperas almenaŭ du interesaj kaj plurdimensiaj figuroj, ĵurnalisto kaj policisto. Krome troviĝas en multaj partoj de la verko socisatira tendenco, kiu mokas burokrataĵojn kaj politikajn apartaĵojn de Italio, sed fojfoje ankaŭ misojn kaj fuŝojn ĉie en la mondo. La lingvaĵo estas ĝenerale bona.

Poste, en 1990, aperis dua verko de TAVANTI, ĉifoje kun dua

kunaŭtoro nomo sur la kovrilo, István ERTL. Kiel ERTL poste klarigis, temas fakte pri itallingva manuskripto de TAVANTI, kiun ERTL kunlabore kun TAVANTI esperantigis. Malgraŭ tio, la romano *Tiu Toskana septembro*, eniĝis en nian originalan literaturon. Kompare kun la unua verko de TAVANTI, mankas en la dua esperantistoj kaj teroristoj, sed eble pli gravas ke mankas ankaŭ la rapida ritmo. Ĉifoje temas pri pli ordinara, privata murdo en malnova itala urbeto. Tamen la urba etoso kaj medio bone prezentiĝas, kaj ankaŭ la du policistoj, kiuj enketas. La lingvaĵo estas iomete malpli bona ol tiu de *Varmas en Romo*.

Parolante pri esperantistoj kaj murdoj, ni ne rajtas forgesi la libron *Murdo en Esperantujo* el 1988, de Daniel MOIRAND, kiu alie estas pli konata pro 331-paĝa verko pri la Esperanta akuzativo. Lia krimromano, kiu ampleksas nur la duonon, komenciĝas tre bone. Nekonata viro eniras en la kunvenon de vilaĝa Esperanto-klubo kaj falas teren, murdita per tranĉilo en la dorso. La esperantistoj alvokas la policon kaj pluigas sian kunvenon. Tre simbole, ĉu ne? Io terura ĝenas la izoliĝon de la esperantistoj, sed ili ne lasas sin ĝeni. Bedaŭrinde nek la policisto, nek la aŭtoro, entute interesiĝas pri siaj taskoj, tio estas la murdo kaj la murdenketo. La policisto, kontraŭulo de Esperanto, dediĉas sin al debato kun la esperantistoj, dum neniu zorgas pri la murdito, kiu plu kuŝas en sangoflako en angulo de la kunvenejo. Kaj tiel pluas. La detektivo anstataŭ okupiĝi pri la kazo aĉetas librojn de BAGHY en brokantejo, kaj kompreneble baldaŭ iĝas esperantisto. Kvazaŭ hazarde li krome solvas la murdo-kazon, sed tio ja estas flanka afero.

Mi finos menciante du romanojn de István NEMERE. Fakte, krimoj kaj solvado de tiuj rolas en pluraj el liaj verkoj, apud aliaj temoj. Tio validas ekzemple pri *Pigre pasas la nokto* el 1992. Sed *Nesto de viperoj* el 1994 kaj *Serĉu, kaj vi trovos* el 1999 estas ekskluzivaj krimromanoj, se tiel diri. Bedaŭrinde tio signifas ankaŭ, ke ili ne estas inter la legendaj verkoj de NEMERE, laŭ mia

opinio. La intrigoj estas ege kliŝaj kaj plenaj de logikaj mankoj. La personoj estas same kliŝaj. Nesto de viperoj baziĝas sur la ideo "fermita ĉambro", sed male al aliaj verkistoj, NEMERE faras nenion por garantii, ke neniu de ekstere povas esti la murdinto. Ankaŭ lingve ĝi estas malbona, supozeble pro manko de redaktado.

En ambaŭ verkoj grave rolas interŝanĝo de individuoj, kiujn la aŭtoro ne sukcesas kredindigi. Krome, en ambaŭ rolas ia troigita gravigo de kreantaj metiistoj, aŭtoro kaj pentro-artisto, kio eble esprimas la personajn ambiciojn de NEMERE. En *Serĉu, kaj vi trovos* ni trovas la unuan Esperantan detektivinon, kiu bedaŭrinde iom suferas pro kliŝaj priskriboj. La enketado, kiun ŝi plenumas kun vira – aŭ pli ĝuste knaba – kolego, estas eble la plej fuŝa en la Esperanta krimliteraturo. Malgraŭ ĉi tiu severa prijuĝo, oni devas konfesi, ke NEMERE estas sufiĉe profesia metiisto por krei rakontojn legeblajn, kie nepostulema leganto fakte povas trovi distraĵon kaj moderan eksciton. Tamen estas iom strange, ke NEMERE ne bone sukcesis en ĉi tiu ĝenro. En alia, proksima ĝenro, kiun eblas nomi "agent-romanoj", li laŭ mia opinio sukcesis multe pli bone per sia roman-duopo *Vivi estas danĝere* kaj *Vi povas morti nur dufoje* el 1988-89.

## *Karakterizado kaj valoro*

Ĉu eblas resume karakterizi la Esperantajn krimromanojn? Ĝenerale ili suferas pro similaj mankoj kiel aliaj Esperantaj verkoj, kiel mallerta tekniko de literatura kreado, stranga lingvaĵo, la manio verki kaj eldoni por pruvi, ke tio eblas en Esperanto ktp. Tamen ĉe tiaj distraj verkoj tio eble malpli multe ĝenas, ol ĉe verkoj kun pli serioza celo. Cetere, ankaŭ alilingvaj krimromanoj kelkfoje estas preteksto por trakti interesajn temojn, karakterojn kaj ideojn.

Iom surprize estas, ke internaciaj rilatoj plejparte mankas en la Esperantaj krimromanoj. Multaj el ili okazas ne en la reala mondo,

sed en ia fikcia, artefarita aŭ neŭtrale malpreciza lando. Kiel montras la verkoj de ELGO, tia loko tamen povas havi tute specifan karakteron kaj etoson.

Inter la aŭtoroj de Britaj kaj Skandinavaj krimromanoj abundas virinoj, kiuj ofte estas inter la plej popularaj krimaŭtoroj. Ĝis nun tamen neniu Esperanta krimromano havas inan kreinton.

Cetere, kial entute tiom paroli pri krimrakontoj? Ĉu ni bezonas ilin? Ĉu ili alportas ion valoran?

Unue, temas pri distraĵoj. Distraĵoj estas gravaj. La homo ne vivas sole el pano, sed krome el dolĉaĵoj. Oni bezonas ripozi, malstreĉiĝi kaj amuziĝi. Eble ŝajnas strange, ke oni povas malstreĉiĝi legante ekscitan rakonton pri murdoj, sed tiel estas. Eble dank' al la fiksita kaj limigita formo. Kaj tiu formo utilas ankaŭ por la verkisto, kiu volas trakti interesajn kaj eble malfacilajn temojn. La krimintrigo estas kvazaŭ la dolĉa kaj aroma ŝelo, kiun la verkisto ŝtopis per siaj ŝatataj temoj.

Tamen, tio funkcias nur, se la krima ŝelo estas bone farita! Facilus mencii ekzemplojn de krimromanoj el diversaj landoj kaj lingvoj, kie la verkisto traktis gravegajn temojn. Homa psikologio, idilia mediopriskribo, socia kritiko, politika propagando, eĉ religia edifado estis pakita en rakontojn pri kiu murdis kiun. Kaj se ni parolas pri Esperantaj verkoj, ankaŭ lingvaj ideoj estas prezentataj en formo de krimula dialogo kaj polica pridemandado. Eble la distraĵaj, leĝeraj verkoj, kiel krimromanoj, eĉ havas same grandan signifon por la lingva evoluo kiel la vortaroj kaj gramatikoj. Do, venontfoje kiam vi trafas en diskuton pri iu neologismo, ne plu diru "ĝi troviĝas en PIV", sed "ĝin uzis Jano KARAL kaj inspektoro KRAMER"!

## Turismo

# Pasporta Servo - Ni montru la gastigemon de Sudafrikanoj!

Magali Von Blotnitz

“Kio? Vi ne konas Pasportan Servon? – Hej, aŭskultu, ŝi ne konas Pasportan Servon!”


Jen kion oni diris pri mi antaŭ deko da jaroj kiam mi ekfrekventis junajn francajn esperantistojn. Mi jam bone regis la lingvon, sed efektive, mi havis neniun ideon pri tiu stranga „Pasporta Servo“.

Do, se ankaŭ vi ne vere scias, pri kio temas, vi estu pardonita ! Sed, vi rapide legu tiun artikolon kaj riparu tiun nescion!

Pasporta Servo, en mia opinio kaj en tiu de multaj aliaj esperantistoj, speciale junaj, estas unu de la plej gravaj praktikaj avantaĝoj de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj. *Ĝi estas pruvo, ke Esperanto utilas kaj funkcias.* Sed, kio do ĝi estas?

Nu, iasence Pasporta Servo estas nur eta libreto... Imagu poŝlibreton, iom pli ol 200-paĝa, kun adresoj de esperantistoj tra la mondo. La 2005-a eldono havas 1364 adresojn el 189 landoj. Ĉu do ia jarlibro? Ne, ne, Pasporta Servo estas multe pli ol tio.


Ĉar la homoj, kies adresoj aperas en Pasporta Servo, per tiu





libro sciigas la mondon, ke ili pretas senpage gastigi aliajn esperantistojn en sia domo. Kaj ili indikas la kondiĉojn (maksimuma daŭro, nombro da homoj, kiel ili dormos, kion ili rajtas, ktp).

Jen ekzemple kion diros nia anonco por 2006:



Nun vi komprenas: se vi devas aŭ deziras vojaĝi ien ajn, vi povas trovi en tiu lando homojn kiuj gastigos vin senpage. En kelkaj urboj vi povos elekti gastigantojn kiuj plej taŭgas al vi (laŭ aĝo aŭ komentoj) aŭ translokiĝi de unu al la venonta por kelkaj semajnoj. Ĉu por turismado aŭ por laboro, vi povos malkovri la gastigan landon sen loĝi en senanima hotelo; vi renkontos homojn, malkovros ilian vivstilon, povos babili kun ili kaj eble akiros geamikojn por la vivo!

Aliflanke vi povos ankaŭ profiti eĉ se vi ne vojaĝas. Se vi estas gastiganto, vi renkontos homojn el aliaj landoj kiuj venos al Sudafriko. Dum ilia restado, vi povos montri al ili vian urbon kaj regionon, rakonti pri via vivo kaj ekscii pri ilia devenlando. Vi ne

*devas* gastigi ĉiun – eble se iu kontaktas vin kaj vi en tiu tempo ne kapablas gastigi, vi povos rifuzi.

Entute: estas nur avantaĝoj, apenaŭ iu malavantaĝo!

Kaj nun la **granda ŝoko**. Por Sudafriko la libro montras **nur unu** adreson: la nian. **Kial???** Ĉu en Sudafriko ne ekzistas pliaj esperantistoj? Ĉu Sudafriko ne estas gastigema lando? Kion pensos la vojaĝemuloj se ili planas sian itineron?

Kompreneble kelkaj esperantistoj en Sudafriko estas malriĉaj kaj tute ne povas oferti luksan gastigadon al aliaj homoj. Nu, vi povas en la formularo alkruci “mia loĝejo estas 1-ĉambra”. Kelkajn dors-sakulojn tio ne ĝenas. – Kelkaj esperantistoj en Sudafriko ne ege bone regas la lingvon – Nu, vi povas en la komentoj indiki tion. Denove, multaj vojaĝantoj kapablas kompreniĝi kun eksterlandanoj per manoj kaj piedoj, se ili havas sufiĉan intereson kaj inklinon. Kelkaj eble timas, ke ili baldaŭ translokiĝos? Nu, vi povas indiki tion ankaŭ, kondiĉe ke almenaŭ unu de viaj kontaktdetaloj (ekz. la retadreso) restos neŝanĝita.



*Germana vizitinto Gerhard Hirschmann (en la mezo) trovis nian kontakton tra Pasporta Servo.*

Do – ne hezitu pli longe! Registriĝu kiel gastiganto! Vi povas registri interrete (<http://www.tejo.org/ps>) aŭ peti de la mi aliĝilon. Dum nia venonta kongreso ni havigos kopiojn de la formularo al ĉiuj, kiuj deziras ĝin. Eĉ se vi ne estas gastiganto, vi povas aĉeti la pasportan servon tra nia asocio.

Por pliaj demandoj kaj komentoj kontaktu min – miaj detaloj estas... en la Pasporta Servo!

## Anekdotoj

### *Google*

En kabaneton, kiu staras ĉe monto-malsupro, venas plorantaj geedzoj kaj diras al sidanta tie viro:

“Hieraŭ nia filo iris en la montaron skii, kaj ĝis nun ne revenis!”

“Ne ploru. Kiel nomiĝas via filo?” - diris la viro.

“Andrej Petrov!”

La viro kapjesis kaj kriis: “Google, venu al mi!”

El la korto enkuras grandega hundo. La viro diras:

“Andrej Petrov, cxu vi komprenis? Serĉu!”

Post kelka tempo Google revenas kaj diras:

“Via peto ne donis rezultojn. Mi trovis 345235 Andrej-ojn kaj 245098 Petrov-ojn. Ĉu eble mi sercxu en la valo?”

Grigorij L. AROSEV <[grigorij@land.ru](mailto:grigorij@land.ru)>

### *Du alternativoj*

En Parizo iu homo venas en patentan buroon por registri sian inventon: motoron por aŭtoj, kiu estas saturata ne per benzino, sed per akvo. Oni kontrolis, la afero efektive funkcias! Dum plenigado de diversaj enketiloj, la buroanoj diras al la inventisto:

“Ni povas proponi al vi du alternativajn variantojn: aŭ registri

vian inventon unuope, aŭ kiel du: akvomotoro kaj akvo kiel brulmaterialo. Ja vi estas fakulo pri brulmaterialoj?”

“Jes, mi tre longan tempon laboris en Sauda Arabio, en ties naftoproduktejoj. Cetere, ĝuste tie mi faris mian inventon.”

“Sed kial vi ne registris vian inventon tie?”

“Mi provis. Sed kiam mi priskribis al tieuloj mian inventon, ili same proponis al mi du alternativajn variantojn.”

“Kiujn do?”

“Esti mortpafita aŭ esti mortpendigita.”

Grigorij L. AROSEV <[grigorij@land.ru](mailto:grigorij@land.ru)>

## *Titolo*

“Kiel vi devas paki paraŝuton.” Eldono la 2-a. Korektita.

Kozlov Alekseo <[boogier@52.ru](mailto:boogier@52.ru)>

## *Spegulo*

La reĝino staras antaŭ la spegulo kaj demandas ĝin:

"Spegulo ora, kara, sur la muro,  
Kiu estas la plej bela en naturo?"

"Moviĝu flanken, mi ne vidas!"

Adrian Boldan <[boldan@rogers.com](mailto:boldan@rogers.com)>

## *Ĉu pli longa lango*

Joĉjo etendas brakon trans la tablon por preni la salon, kiu staras aliflanke.

Jozefino: “Joĉjo! Ĉesu etendi vian brakon tiel! Ĉu vi ne havas langon?”

Joĉjo: “Jes, panjo. Sed mia brako estas pli longa.”

Rikardo Cash <[rcash@free.fr](mailto:rcash@free.fr)>

## *Riĉa*

Kruko: “Mia direktoro estas riĉa.”

Baniko: “Ĉu? Kiom riĉa?”

Kruko: “Li estas tiom riĉa ke mia kolesterolo plimultiĝas kiam mi estas en la sama ĉambro kiel li.”

Rikardo Cash <[rcash@free.fr](mailto:rcash@free.fr)>

## Esperanto kulturo

# La esprimo “Krokodili”



WIKIPEDIO  
La libera enciklopedio

Adaptita el Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org/>)

Krokodili estas Esperanta idiotismo kun la signifo “en Esperanta medio paroli lingvon kiu estas la gepatra lingvo de ĉiuj ĉeestantoj.” Por similaj trajtoj ankaŭ ekzistas la vortoj *aligatori* kaj *kajmani*. Kelkfoje la vorto krokodili estas uzata kun pli ĝenerala signifo de “krokodili, aligatori aŭ kajmani”. Malofte oni tiam ankaŭ uzas la vorton reptilumi. Malo de krokodili estas gaviali (aŭ malkrokodili) - “paroli en ne-Esperanta medio Esperanton, kiam alia lingvo pli taŭgas”.

Krokodilado estas ĝenerale malakceptata inter esperantistoj. Oni volas eviti ĝin por pli bone praktiki Esperanton, por ke oni povu bone uzi ĝin, kiam oni vere bezonas ĝin, parolante kun eksterlandanoj. Homoj, kiuj nur malofte povas vojaĝi eksterlanden, alikaze preskaŭ neniam havus la eblecon praktiki sian Esperanton. Dum internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, krokodilado povas kaŭzi nekomprenon, kaj tial estas eĉ malpli akceptata ol en kunvenoj de samlandanoj. Aldone, krokodilado povas kaŭzi malbonan impreson al vizitantoj ĵurnalistoj aŭ aliaj eksteruloj ĉe la aranĝoj, ĉar ili povus pensi ke per Esperanto oni ne povas bone esprimi sin. Ĉiuj ĉi kialoj kune igas la krokodiladon malakceptata inter esperantistoj, tiel ke ili ofte

instigas homojn paroli Esperanton, eĉ se tiuj ne absolute necesas por rektaj komunikaj kialoj.

Tamen, foja krokodilado kun komencantoj por klarigi gramatikajn detalojn estas pli akceptata. Sed multaj preferas alparoli komencantojn per simpla, malrapida Esperanto, por ke ili baldaŭ plibonigos sian lingvoscion.

Paroli en fremdlingvo por plibonigi sian scion de alia fremdlingvo en Esperanto-aranĝo estas iom pli akceptata trajto. Tio nomiĝas *aligatori*.

## *Etimologio*

Pri la etimologio de la esprimo krokodili oni ne certas. Tamen ekzistas pluraj klarigaj teorioj. Onidire krokodiloj ploras manĝante viktimojn. Analoge, krokodilanto plendas pri la fato de Esperanto, sed mem kontraŭefikas ĝin. Alia teorio estas, ke la uzon de **krokodilo** por slange indiki neesperantiston enkondukis la italdevena FERRARI, taksiisto en Parizo dum la 1930-aj jaroj. “Kion volas tiuj krokodiloj?” li kutime apostrofis la neesperantistojn, kiuj brue envenis la kafejon kie li estis babilanta en Esperanto kun samideanoj. Ankoraŭ nun kelkfoje “krokodilo” sinonimas al neesperantisto. Tamen, pli ofte ĝi signifas “Esperanto-parolanto, kiu en Esperanto-medio parolas nacilingve.”

Alia klarigo de **krokodili** devenas el la Cseh instruado. Kiam Andreo CSEH instruis li ĉiam kunportis lignajn bestojn. Dum liaj kursoj neniu rajtis paroli sian gepatran lingvon, krom se tiu havis la krokodilon en la mano.

